Hans Hubalek
Rothenburg o/T.
Judeng. №29

4-a Jaro. N-o 196 APERAS SEMAJNE 5. Julio 1928




ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

## MAXIM GORKI PRI PROLETA VERKISTO

*Post longa restado en Sorrento (Italio) M. Gorki, la tutmonde konata verkisto, revenis al Sovetio, kie li ĝojege estis akceptata de la laboristoj. Ili vidas en li eminentan reprezentanton de proleta literaturo. Pri tio Gorki respondis al la Literatura rondeto ĉe la profesi-teknika lernejo en Pokrovsk per letero, kiun ni iom mallongigite represas ĉi sube.*


*Red.*

Vi demandas: "Laŭ kiuj signoj oni povas difini efektive proletan verkiston?" Mi opinias, ke da tiaj signoj ekzistas multe. Al ili apartenas aktiva malamo de verkisto kontraŭ ĉio, kio jugas homon el-ekstere aŭ el-interne, kontraŭ ĉio, kio malhelpas liberan disvolvon kaj kreskon de hom-kapabloj; senindulga malamo kontraŭ maldiligentuloj, parazitoj, trivialuloj, malnobluloj kaj ĝenerale kontraŭ sentaŭguloj de ĉiuj aspektoj kaj specoj.

Estimo de verkisto al homo, kiel fonto de krea energio, kiel kreinto de ĉiuj objektoj, de ĉiuj mirakloj sur la tero, kiel batalanto kontraŭ elemento-fortoj de l' naturo kaj aperiginto de nova, "dua" naturo, kreata per laborado de homo, per lia scienco kaj tekniko, por liberigi lin de senutila elspezo de korpaj fortoj, de elspezo neeviteble malsaĝa kaj cinika en kondiĉoj de klasa regno.

Poeziigo de la kolektiva laboro, kies celo estas kreo de novaj formoj en la vivo, de tiaj formoj, kiuj tute esceptas potencon de homo super homo kaj sensencan ekspluaton de ties fortoj.

Juĝo de verkisto pri virino ne nur kiel pri fonto de fiziologia ĝuo, sed kiel pri fidela kamarado kaj helpanto en malfacila tasko de la vivo. Rilate al infanoj, kiel al homoj, antaŭ kiuj ni ĉiuj estas respondecaj pri ĉio, kion ni faras. — Celado de verkisto, ĉiel altigi la aktivan rilaton de la leganto al la vivo, sugesti al li certiĝon je lia propra forto, je liaj kapabloj venki en



si mem kiel ankaŭ ekster si ĉion, kio malhelpas al la homoj kompreni kaj eksenti la grandegan sencon de l' vivo, la kolosan signifon de la ĝojo je laboro.

Tio estas en mallonga formo mia opinio pri verkisto, kiun bezonas la laborula mondo. Vi scias, ke en tiu ĉi mondo de la laborantaj homoj vekiĝas volo al regpotenco, ke la vekiĝprocezo de tiu volo disvolviĝas ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio, Afriko, sur la tuta terglobo.

Verkisto ne devas subigi sin al la venena rubo de l' "estadumo", sed plej persiste batali kontraŭ ĝi; li ne devas ĝemi kaj plendi, ke "la bagateloj de l' vivo" ĝenas lin, iom malhelpas al li; li devas scii, ke la kriplaĵoj de vivkutimoj malhelpas al ĉiuj, kaj per plendoj oni ne povas venki ilin; nur kuraĝa lukto, nur persista ĝoja laborado superas ĉiujn kriplaĵojn de nia vivo.

Verkisto devas scii kaj memori, ke homo, laŭ sia naturo, ne estas "sentaŭgulo", sed ekzistaĵo, malbonigita per abomena organizo de l' klasa regado, kiu ne povas ekzisti, ne perfortante homojn, ne ekscitante en ili envion, koleron, avidon, maldiligentecon, abomenon kontraŭ sklaveca kaj ofte sensenca laboro. Ne ekscitante emon al facila profito, al malkaraj kaj fiaj plezuroj, al malĉasto, drinkemo kaj ĉiaj malpurajoj.

Vi, gejunularo, devas scii kaj memori, ke ekzistas homoj, al kiuj estas profite kaj necese konfirmi, ke la "sentaŭgeco" estas "ennaskita", kiel ili diras, eco de l' homo, ke ĝi havas radikon en liaj zoologiaj, bestaj instinktoj kaj estas "sugestata de diablo, ke la agoj de la tuta homaro estas "esprimado de el pratempoj daŭranta lukto de l' diablo kun dio pro posedo de la homa animo."

En la fundo de tiu prediko estas la klara aspiro limigi, mortigi la voladon de l' homo al pli bona vivado, al libero de laboro kaj verkado, estas la celado kreskigi lin kiel sklavon de la klasregado kaj klasa socio. Tia prediko konsideras la homon nur kiel krudan materialon, kiel minaĵon, el kiu oni povas prepari hakilojn, ĉenojn, bajonetojn,

gladilojn, ĝenerale ilojn, instrumentojn. Predikantoj de tiu instruo ankaŭ estas "sentaŭguloj", t. e. homoj netaŭgaj por honesta, aktiva, labora vivado, homoj, kiuj ne povas kaj eĉ ne volas imagi la vivon en aliaj formoj, ol tiu, en kiu la vivo estas enkadrigita cinike kaj maldigne por la laborula popolo. La prediko pri la "ennaskitaj" aŭ pri la de diablo-sugestoj devenantaj malbonaj instinktoj estas facile renversata per tiu fakto, ke la tiel nomataj "sovaĝuloj" — negraj gentoj de Afriko aŭ la siberiaj gentoj — jakutoj, burjatoj, tungusoj — esence estas tre bonkoraj homoj, kiel tion pruvas la etnografoj ... Trad. SAT-ano 10 996.



# LETERO EL KANADO

Ne ekzistas ĉi tie komunuma, urba aŭ ŝtata subtenado por la senlaboruloj. Se la laborforto ne povas esti vendata, la laborulo tre baldaŭ transformiĝas el ano de l' popolo en popolan naŭzaĵon kaj estas rigardata kiel tia. Al tiu kategorio apartenas nuntempe en Kanado kelkaj centmiloj.

Preskaŭ ĉiuj minaĵoj en la minejoj estas elfositaj en Norda Ameriko. La ĉefajn produktojn formas karbo, fero, kupro, nikelo kaj arĝento. La labortago, en la plej multaj okazoj, estas okhora, kaj multaj laboristoj estas pagataj laŭ la produktokvanto per kontraktsistemo. Tiuj kontraktoj estas kalkulitaj en la detaloj — per multjareco de dungiteco kaj laborpremioj — tiel, ke nur plej lertaj kaj fortaj laboristoj povas gajni iom pli ol ordinaruloj. Kvankam niaj ministoj en 1926[1]) laboris nur parton de tempo, t. e. kelkajn tagojn de la semajno, aŭ kelkajn horojn tage, ilia produktokvanto po kapo estis trioble pli granda, ol tiu de la germanaj ministoj. La salajro varias de $ 3,15 ĝis $ 5 tage. Se oni konsideras, ke la ministoj nur parte laboras, la jara salajrakiro ne eĉ proksimas la bezonatan minimumon, por pagi la kostojn por la plej necesaj utilaĵoj.

La kvanto-da industriproduktoj ĉi tie superas ĉiujn aliajn regionojn kompare kun la nombro de laboristoj. Multo el tiu alta produktado estas konsumata de la laboristaro mem, en formo de altaj salajroj. Tiuj salajroj ekzistis en 1926[1]) en 13 diversaj industrioj (0,42 dol. hore), kaj ofte la labortago estas dekhora kaj la taga salajro kalkulita en horsalajro laŭ okhora tago. La salajro de la laborantaj virinoj en la plej granda parto de la industrio ne superas 0,19 dol. hore. Mi havas antaŭ mi la raportojn faritajn de diversaj komitatoj de l' parlamento, laborunuiĝoj, filantropaj asocioj kaj policoficejoj, kaj ne eĉ unu el ili asertas, ke la ricevata meza salajro sufiĉas. Se la salajro sufiĉus, ne povus okazi, ke nur la duono de la virinaj laboristoj estas edzinoj kaj patrinoj. La "koloraj" laboristoj, negroj, azianoj k. a. eĉ nur ricevas $^2/_3$ de blankula salajro. Plej bonaj salajroj, en kelkaj lokoj pagitaj en 1926[2]) estis por viroj $ 0,65, por virinoj $ 0,40 po horo.

La kamplaboristoj en la sama jaro ricevis kun manĝaĵo $ 1,76, sen manĝaĵo $ 2,30 tage. Arbarlaboristoj, kiuj havas grandajn elspezojn por vestoj, havas pli bonan salajron, sed nur junaj, fortikaj, vivplenaj viroj estas dungataj. Se vi dekalkulas ilian konsumon de ŝuoj, paro kaj jaro, ĝis $ 16, paro da gantoj ĉiutrimonate por $ 3,50 kaj manĝado por $ 1,35 tage, tiam ilia salajro estas kiel lastvintra neĝo[1]). Ne donante pliajn detalojn, mi tamen diru, ke ĉefkuracisto el unu ĉi tiea urbo konfesis, ke li konas kelkdekojn da familioj en la urbo, kiuj en okazo de nasko de infano ne povis trovi iajn vestojn por kovri la etan korpon; por tion fari, la patrino devus iri sen jupo. 29-ano.

[1]) Ni ne komprenas, kial nia korespondanto liveras informojn rilate al 1926. — Red.

[1]) Kredeble la K-do volas diri, ke ĝi formalaperas. — Red.



## Bretonio al la bretonoj

Ne estas ŝerco. Ekzistas ja movado por la sendependeco de Bretonio kun du asocioj kaj 9 gazetoj. Tiu movado estas vere internaciista. Ĝi eĉ eldonas esperantlingvan revueton, el kiu ni citu jenon:

"Ni, Bretonoj, volas stariĝi, en nordokcidenta Eŭropo, intelektan naciaron klare distingeblan kaj forte kunligitan. Por ke Keltujo estu realeco, ne revo senesenca. Ĉar ni devas pri tio elekti iun ajn helplingvon, nek franca nek angla ĝi estu. Sed estu ĝi lingvo, kiu niajn keltajn lingvojn neniel minacus, kaj nin facile rilatigus inter ni kaj kun la tuta homaro. Katon, karaj fratoj, ni volas, ne ratojn, en nia kelta grenejo."

Tiuj keltaj internaciistoj kongresis en la jaro 1925 en la ĉefurbo de Irlando. Ili estis tre ĝenataj pri la diverseco de lingvoj, tial ke la irlanda, skota kaj bretona lingvoj ne estas tute similaj. Kontraŭvole ili devis paroli france kaj angle. Tio ege ĉagrenis la kongresantojn. Estas ja hontinde kaj malkuraĝe paroli en la lingvo de la subpremantoj:

"Per bojado oni hundiĝas, eĉ bojante kontraŭ hundoj ..." diras niaj keltoj, kiuj volas konservi pure sian nacian spiriton ... Mi certigas, ke mi ne ŝercas, kaj se vi dubas, nu, mendu la revueton: Nord-Okcidento, aldono al "Gwalarn", B. P. 75, Brest (Bretonio). Eŭtrapel.



## Inaŭguro de monumento por Ferdinand Lassalle (Lasal) en Vieno

Meze de grandiozaj komunumaj loĝej-konstruoj altiĝas kvazaŭ kreskanta el la ŝtonaro de l' strato, la monumento de Ferdinand Lassalle. Ĝi



efikas unuamomente iom stranga. La artisto rezignis la ĝisnunajn formojn. Nova kaj antaŭe ne ekzistinta, kiel la moderna laborista movado, estas la ekstera formo de la monumento. Ĝi estas esprimo de danko al la ekvekinto de la germana laboristaro, kiun metis al li la Viena laboristaro, en mezo de la ruĝa Vieno. 6-an de majo okazis la solena inaŭguro. J. Slezak.

**Leterkovertojn**

viajn kaj **poŝtkartojn** por via korespondado mendu ĉiam nur ĉe la **Administracio de SAT**, Colmstr. 1, **Leipzig 0 27** (Germ.). — Ĝi liveras al vi belajn kovertojn (blanka, senligna papero) kun bonefika verda surpreso propaganda por 2 mk. g. po cento, samspecajn poŝtkartojn (tutflanke surskribeblaj) por 1.10 mk. g. po cento.

# La koloniigo de Nova Gvineo

La 7. junio okazis kunveno en Hago je nomo de la unuiĝo por koloniigo de Nova Gvineo[1]). Parolis ned.-hindia oficisto, kiu nun libertempas en Nederlando, kaj la ministro de laboro sendis reprezentanton. La parolanto diras, ke la situacio por miloj da junaj laboristoj en Nederlanda Hindio estas malespera, ke tamen oni devas klopodi konservi tiujn laborfortojn por la "nederlanda nacio" kaj tial krei novajn laboreblecojn en Nova Gvineo. Bona koloniigado foriĝos la senlaborecon ne nur en Hindio, sed ankaŭ en Nederlando. La kamparanaro trovos savon tie. Ankaŭ kuracistoj kaj teknikistoj estas tie bezonataj. Plie li diris, ke la indiĝenaro iom post iom formortas. Ekzemple la gento "Koja-Kojas" nombras nur ankoraŭ 15 000 homojn, kiuj ĉefe ekstermiĝas pro fimalsanoj. Kiel pruvon de formortado li ankaŭ citas, ke naskiĝas pli da knabinoj ol knaboj. La veneraj malsanoj estas enportataj de Nederlando (kion la parolanto cetere neas). La popolkonsilantaro decidos pri la solvo de l' koloniiga problemo. En Nederlando mem la surpluso da homoj ĉiujare timige kreskas. Sed oni deziras enlasi Novan Gvineon nur leĝe edziĝintajn personojn. Kaj la partoprenontoj mem fiksu la laborkondiĉojn (malfeliĉaj indiĝenoj!). En la norda parto de Nova Gvineo oni komencu ekspluati. La lando estas riĉa je sovaĝaj bestoj kaj arbaroj, la transporteblecoj estas bonaj. Estas la intenco pretigi 100 000 kampojn. La registaro donas kreditojn je tre favoraj kondiĉoj. Stariĝos kreditbanko sur tiu insulo. Kiaj ŝancoj ekzistas, pruvis la parolanto per la mencio, ke dum 4 monatoj estis eksportataj arbarproduktoj por 1 250 000 guldenoj. Tio estis ebla pro la malkaraj ĉiniaj laborfortoj. — Fine de la kunveno oni fondis Nederlandan sekcion de ekspluatistoj. Do, la ludo povas komenciĝi! Plej juna, 5288.

[1]) Granda insulo el la Nederland-Hindia insularo.



# La kamparana potenco en Belgio

La "Boerenbond" (elp. Burenbond: kamparana ligo) estas la plej potenca kamparana organizo en Belgio. Ĝi grupigas la flandrajn kamparanojn kaj estas gvidata de la pastraro; ĝia sekretario estas ekleziulo. Post 35 jaroj da persistaj klopodoj, tiuj ruzaj kaj lertaj agentoj de la klerikala reakcio fine trafis limojn en la eklezia kaj kapitalisma vojo. Ili puŝiĝis al tiu socia potenco, kies interesoj estos nur kontentigataj per la Revolucio.

Fine de la 1927 "Boerenbond" unuigis 1184 gildojn (lokajn korporaciojn) kun 112 978 familiestroj, kaj la junularaj sekcioj kalkulas 15 000 membrojn. Ĝi posedas 247 teknikajn bibliotekojn, 104 sindikatojn por brutar-ekspluatado kaj kelkajn kaprajn sindikatojn. Ĝia "aĉet- kaj vendkontoro" aĉetis 1927: 375 926 250 kg. da sterkoj, brutarnutraĵoj kaj aliaj krudaĵoj, por 5 695 000 frk. maŝinojn, laktilojn ktp. kaj vendis 35 350 000 kg. da printempaj terpomoj, 1 167 175 kg. da butero, 40 775 000 ovojn, por 407 500 frk. fruktojn kaj por duona miliono da frankoj legomojn. 940 lokaj kasoj aliĝis al "Centra Kreditkaso", kies deponaĵo estas 966 600 000 frk. Ĝi konsentis 77 kreditmalfermojn al lokaj kasoj por 11 276 000 frk. kaj 225 hipotekajn pruntojn por 9 088 900 frk. Depost sia fondiĝo tiuj lokaj kasoj ricevis 1 489 420 000 frk. depone kaj pruntis 405 679 000 frk.

La asekura societo de l' "Boerenbond" pritraktas la viv-asekurojn, akcidentojn, brulegojn, hajldomaĝojn ktp. La notitaj pagoj sumiĝis en 1927 je 24 542 000 frk. La tuto da polisoj (asekuraj dokumentoj) estis 131 326.

Kun tia financa kaj ekonomia potenco ĝi komprenebie influas la regnan politikon. Dum balotoj la ligo subtenas la katolikan partion, kies deputitoj, pretendante esti reprezentantoj de la kamparanoj, estas veraj reakciuloj, kiuj eĉ en la parlamento voĉdonas kontraŭ la depostuloj de siaj elektintoj. La ministro por kampkulturo estas "Boerenbond"-ano. Dum la monstabiligo la ligo helpis la registaron resanigi "la monon de ĉiuj". Ĝi krome subtenis la registaron kontraŭ la depostuloj de la germanaj kamparanoj en la aneksitaj teritorioj.

La kamparano, natura kunbatalanto de la urba laboristo, estas per sia organizo gvidata de la kapitalistoj, kaj fariĝas tiel danĝera kontraŭulo por la laborist-depostuloj.

Bruselano (8100).

**Laŭ plej freŝdata statistiko, ekzistas en la mondo 126 000 esperantistoj. Certe almenaŭ la duono estas laboristoj aŭ simpatiantoj al niaj celoj. Dume "S-ulo" ne ankoraŭ havas 4000 abonantojn. Ĉu tia stato estas normala? Ĉu ĉiu K-do, konscianta pri la graveco de la gazetaro, faris sian varban devon?**

# Mia vojaĝo en Germanio

Ne sufiĉas, lerninte esperanton, diri: nun mi scipovas la lingvon, nun mi povas ripozi! Kiam mi antaŭ tri jaroj lernis ĝin, estis mia plej kara deziro, viziti eksterlandon. Kaj ĉar mi ĉiam ŝatis Germanion, mi volis unue vidi tiun landon.

Antaŭ du jaroj mi legis en "S-ulo", ke iu K-do el Elberfeld petis korespondantojn. Mi rapide skribis al li, kaj post unu semajno ni jam traktis diversajn politikajn temojn. Mi konatiĝis kun li en Lyon dum la SAT-kongreso. De tiu tempo ni estas kvazaŭ fratoj. Li invitis min. Kaj mi, kun neesprimebla ĝojo, certigis, ke nepre mi vizitos lin en Germanio. Ni elektis la majan tempon, ĉar tiam plej bela estas la naturo.

Mi forveturis la 4-an de majo al Elberfeld. Mi trapasis Belgion kaj estis la alian matenon en Germanio. Dum la nokto, dum la daŭro de ok horoj, mi vidis sep diversajn homojn, kiuj petis ion de mi; iu homo en nekonata kostumo parolis al mi, sed mi ne povis kompreni lin. Je la 8-a mi atingis Köln. Tie mi devis transvagonariĝi. Mi petis informojn de deĵoristo . . . franclingve. Ĉar li ne komprenis min, mi parolis angle kaj esperante, sed nenion li komprenis. Mi do serĉis kaj trovis kun helpo de pola vojaĝanto la vagonaron. Tiu detalo kredeble ne povas interesi vin, sed por mi ĝi estis grava, ĉar en tiu momento mi pli bone komprenis la gravecon de la lingva problemo ol per ĉiuj alvokoj. Post unu horo mi atingis Elberfeld. Mia korespondanto ĉeestas kaj ĝoje ni intersalutas nin kaj kore premas la manon. La unuan fojon mi estas en fremda lando. Elirante la stacion, mi ekvidas aervagonaron, nekonatan ĝis nun de mi. Mia impreso estas bona; mi marŝas tra la urbo, rigardante la verdajn sonorilturojn, la florojn ĉe la fenestroj, la domojn diverse kolorigitajn, la homojn, kiuj, eĉ sur la ŝoseo, iras kaj venas silente. Mi provas legi la afiŝojn, la reklamojn, sed krom kelkaj internaciaj aŭ francaj vortoj, mi nenion komprenas. Sur mia dekstra flanko mi vidas unu Vilhelm-on, mi forgesis, ĉu estis la unua aŭ la dua! Ambaŭ apartenas al la sama speco de homoj kiel la Napoleonidaj krimuloj. Mia K-do haltas antaŭ pordo, kaj baldaŭ ni estas en lia hejmo. Tie mi rapide konatiĝas kun la tuta familio. Ĉiuj estas afablaj al mi, kaj ĉiam mi memoros la koran akceptadon, kiun mi ricevis.

Post mia vestordigo la patrino alvokas min por tagmanĝi. Ĉu vi jam vizitis eksterlandon, K-doj?! Se ne, aŭskultu: En Parizo oni manĝas supon, legomojn, viandon, fromaĝon kaj salaton aŭ deserton unu post la alia. Sed tie mi ne plu sciis manĝi: Samtempe oni donis al mi viandon, du legomojn, saŭcon kaj salaton! Ĉion kune. Vere, mi similis al kokino, kiu estus trovinta tranĉilon. Tamen, mi kutimiĝis, kaj post du tagoj mi manĝis "germane". Mi multe promenis en la belega regiono. Kiam mi revenis en la domon, por enlitiĝi, mi denove estis embarasata.

# PARIZO KAJ LA PARIZANOJ

III

En la antaŭa ĉapitro mi parolis sufiĉe malfavore pri la nedisciplineco de la pariza popolo, kiu povas ludi fatalan rolon en la laborista movado. Mi diris, ke la kolektivsento ne estas tre fortika, kaj ke individueca kontentiĝemo superas. Eble ĉe la infanoj malplej oni povas konstati tion, ĉar infanoj ĉiam serĉas siaspeculojn. Tamen mi ofte observis infanojn ludantajn, izole por si mem, unuope, tute kontentaj... Ili ne demandis pri kunuloj, sed okupis sin tiel intense pri la ludado memarangita, ke ili estis plene absorbitaj. La racieca formiĝo, kiu jam montriĝas tre videble en la plej frua infanaĝo — mi observis neniam antaŭe tiujn fruajn signojn de racieco ĉe infanoj ol ĉi tie en Parizo — helpas al la ludanta infano, sin kontentigi mem per ludo. Ofte mi vidis la infanojn fari desegnojn per kreto sur la pavimon de l' stratoj. Ŝajnas al mi, ke ili multe pli ŝatas tion, ol iun ajn alian ludokupon. En ĉiu strato mi renkontis paŝante tiujn kretajn desegnojn, tiujn matematikajn figurojn kaj liniojn. Certe tio estas por mi nova trajto, tute ne renkontita tiamezure en Germanio. Kaj mi aljuĝas ĝin al la pli frua kaj pli akre distingita formiĝo de l' racieca povo, kies floradon ofte en mirinda evoluo oni trovas ĉe la plenaĝuloj. La mistika sento estas tute fremda al la parizano, kaj tial malmulta estas la inklino al religio kaj religiaj aferoj.

Tamen unu limigon mi devas fari, menciante unu aferon tre malracian. Estas la funebraj ceremonioj, kiuj memorigas al tre malnovaj tempoj kaj tute ne akordiĝas kun la nuntempa Parizo. La ĉerko kun la mortintoj estas starigata antaŭ la entombigo en koridoro proksime de la dompordo. La scivolemuloj — kaj kiom da ili ekzistas! — rigardas kun ŝajna intereso (mi ne povas klarigi al mi, kiun intereson homoj povas elmontri por personoj, kiuj estis tute fremdaj al ili dum la vivo). Ili estas atentigataj al la fakto per pompa enkadrigo de la pordego per nigra drapo, kun blanke surkudritaj komencliteroj de l' mortinto. Terure! Kaj la modo tradicia, traveturigi tra la stratoj la mortveturilojn nigre drapiritajn, sekvatajn de la funebrantaro en procesio, ofte en veturiloj! Ŝajne tiuj ceremonioj ne nur estas morala devo por la funebrantoj, plenumo de tradicioj, sed kunligitaj kun ia ĝuo. Oni ne povas adiaŭi de kadavro sen pompo kaj elmontro. Ankaŭ mi trovis, ke la stratpasantoj, kiuj hazarde renkontis tian funebran procesion, deprenis la ĉapelojn (eĉ la laboristoj!), kvazaŭ kliniĝante antaŭ lia moŝto la Morto! Kaj la virinoj krucsignas, kvankam ili ne estas vizitantoj de preĝejo. Estas religia kulto.

Sed unu el la plej neforgeseblaj bildoj, kaj tre karakteriza, por mi estis la renkonto de mortveturiloj — estis ne unu, sed kelkaj en negranda distanco unu de la alia — kun sekvantaroj, dum okazis vivplena butikara foiro en unu el la orientaj bulvardoj. Estis sunbrila dimanĉo, kaj la homoj dense kapo ĉe kapo ondis, premiĝis, rigardante la butikojn, aĉetante lotaĵojn, pagante por la "radoj de feliĉo" (tre ŝatata elspezfonto), kaj amuziĝante, ŝercante, ridante, farante grimacojn sur karuseloj ktp. "Sin amuzi" estas grava faktoro en la parizana vivo. Oni ne tuj bezonas pensi pri Montmartre kaj ĝiaj multkostaj, famaĉaj amuzejoj. La laboristo amuziĝas tre facile kaj kontentiĝas pri tiaj simplaj, senpretendaj amuziloj je siaj dimanĉaj posttagmezoj, kiaj estas la butikaraj foiroj kun siaj tintiloj, siaj muzikaĉo, siaj blufoj kaj sensencaĵoj...

Meze inter tiu amuza festo, inter la butikara sorĉo, inter karuseloj turniĝantaj kaj bruaj elvokistoj trapasis la fluon de l' homamaso la mortveturiloj kun siaj kadavroj kaj la funebrantaro. La karusela bruado, la sonoriltintado daŭras, sed la ekrigardantoj, kvankam absorbitaj de la amuziloj, tute mekanike deprenas la ĉapelojn, ekhaltas momenton (oferas sekundon da gajeco!) en la petola sin-amuzado, por tuj poste, kiam la nigra bildo malaperis, ree gajiĝi kaj amuziĝi kun la sama facilanimeco kiel antaŭe. Kiom najbaraj estas vivĝojo kaj morto! La bildo trudis al mi tiun penson. Ĉu tiuj petolantaj homoj sentis ion similan? Mi komprenas nun tre bone, ke tiu sensaciema popolo ĝuis siatempe la rigardadon de l'gilotinaj ekzekutoj dum la revoluciaj jaroj. Kiam mi antaŭ nelonge legis, kiel Danton estis kondukata al la ekzekutejo, por mi ne estis mirige, legi, ke la pariza popolo kun scivolemo kaj naiveco ĝue rigardadis la spektaklon. Estis bonokaza amuziĝo malmultekosta!...

N u b o.

---

Mi serĉis la supran littukon kaj kovrilon. Mi tuj pensis, ke ili eble forgesis. Sed ne: estas germana kutimo dormi tiele. Sekve mi ankaŭ dormis "germane". Mi partoprenis la esperantistan feston aranĝitan de mia amiko Herweg kaj parolis pri la franca vivo.

Ĉar mi volis vidi multon kaj propagandi samtempe, mi vizitis Essen. Tie ankaŭ mi respondis al la SAT-anoj pri diversaj aferoj. La Essen-a grupo estas forta kaj vigla dank' al K-do Burger. Poste mi vizitis Düsseldorf. K-do Buna tre afable akceptis min kaj faris ĉion por komplezi al mi. Rapide mi volis vidi la Rejnon, la ĉefajn promenejojn ktp. Mi vizitis K-don Remers (malnovan SAT-anon) en la malsanulejo. Vespere mi parolis ĉe la esperantista grupo. Mi nomis ĝin: l a b i e r a g r u p o ! El tiu urbo mi kunprenis bonan impreson.

K-do Liebetrau deziris mian viziton, kaj miaflanke mi tre ĝojis vidi Frankfurt. Dum la vojirado, mi rigardadis la bordojn de la Rejno, la legendajn kastelojn, karajn al Heine kaj Viktor Hügo'. En tiu urbo, kiel ĉie, mi estis tre kore akceptata. Ĉiuj estis afablaj, kaj mi konsideras la esperantistaron kiel grandan familion. Tiu urbo estas trankvila kaj bela; la malnova kvartalo tre plaĉis al mi pro la tipaj arkitekturaj formoj kaj la muraj pentraĵoj. Post du tagoj mi foriris al Mannheim. La afableco estis la sama; kaj la geloĝantoj, ĉe kiuj mi dormis, estas bonaj homoj. Mi fine veturis al Heidelberg, fame konata pro la universitato, la malnova duondetruita kastelo kaj la bela arbaro. La vetero estis bela, kaj mi pasigis neforgeseblan tagon... Sed ĉar ĉio finiĝas, mi devis forveturi kaj reveni al Parizo.

Nun, pripensante mian vojaĝon, mi dezirus fari ankoraŭ kelkajn rimarkigojn. Unue, mi konstatas, ke la geesperantistoj estas pli indaj homoj ol la aliaj. Ke esperanto estas mirinda ilo en la manoj de la proletoj, kaj ke estas domaĝe, ke la popolaj gvidantoj ne komprenas la valoron de nia afero. Alia rimarko, mi vidis multegajn infanojn: la lasta milito ne estis moralinstruo por la germanoj! Kaj mirindaĵo: dum unu monato mi ne vidis homojn interkisantajn sin. Ĉu tiu afero, la plej inda el ĉiuj, estas nur franca invento? — Kaj la ĉefa impreso: Mi ĉiam estis pensinta, ke en Germanio mi havos la okazon vidi statuojn de famaj homoj kiel Brandt, Hans Sachs, Lessing, Goethe, Heine, Auerbach, Dürer, Krafft, Wagner k. a. Sed ho! bedaŭrinda afero, en ĉiuj urboj mi nur vidis Vilhelmon la unuan, Vilhelmon la duan kaj Bismarck-ojn. La popolo ŝatas siajn tiranojn kaj krimulojn. Kiel la romanaj imperiestroj, Hindenburg jam havas sian statuon. Sole la hundoj uzas la monumentojn kiel urinejon. Almenaŭ ili komprenas la valoron de tiaj internaciaj malbonfaruloj!

Mi finis. Gek-doj, faru kiel mi, vizitu alilandon, konatiĝu kun la esperantistaj Gek-doj en la tuta mondo kaj fariĝu veraj sennaciuloj!

M a r c e a u (Marso) (7767), Parizo.

# SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

## TUTUNIA SPARTAKIADO

### Gravega festo en USSR

**Kiel estas konstruita la programo de l' Spartakiado. Amasa elmontra laboro. "Ekspozicio de korpokulturaj atingoj en Sovetio. Ordo de konkuraj plenumoj. Kiel estos ludataj tutuniaj majstrecoj kaj premioj je la nomo de Centra Ekzekutiva Komitato de USSR**

La Tutunia Spartakiado 1928 estas la plej granda korpokultura festo en Sovetio kaj per sia programo ampleksas ĉiujn flankojn kaj aperojn de la larĝe disvolviĝanta korpokultura movado. La malsupre metita programo klarege kaj esprimplene parolas pri tiuj taskoj de l' Spartakiado, kiujn metis antaŭ si la Organiza Komitato.

La programo estas aranĝita laŭ tia kalkulo, ke ĉe ĝia plena efektivigo antaŭ la okuloj de l' rigardantoj preterpaŝos ĉiuj gradoj de okupoj pri korpokulturo por diversaj aĝoj (infanoj, junuloj, maturaj, plenkreskaj homoj). Ĉiuj ĉi momentoj trovas respeguliĝon en la programo, kiu funde dividiĝas en tri ĉefaj partoj.

La **amasa parto** havas celon de agitado kaj propagando de l' korpokulturaj ideoj meze de l' loĝantaro per metodoj de amasaj agoj, kiel: procesioj, paradoj, karnavaloj, scenoj, elpaŝoj de lernantaroj, propaganda kuro, tutunia motorcikla stela trakuro, akvaj demonstracioj, popolaj ludoj, promenoj, komunatingeblaj sportaj amuzaĵoj, amasaj dancoj ktp. La lokoj de amasaj elpaŝoj estos: "Ruĝa Placo", la Parko de Kulturo kaj Ripozo, Moskva rivero, "Vorobjevi gori", stadionoj, placoj ktp.

En la **elmontra parto** estos demonstrataj naciaj kaj karakteraj kategorioj de sporto kaj apartaj sportsistemoj, novaj kaj ne disvastigitaj en Sovetio sportludoj por maturaj homoj kaj lernantoj, korpokulturaj dancoj de diversaj popoloj. Ĉefe estu atentigata pri: "Ekspozicio de atingoj de Sovetia Korpokulturo", kiun, krom Sovetoj de Korpokulturo, partoprenos ĉiuj institucioj, interesitaj je disvolvo de korpokulturo, kiuj organizas memstarajn fakojn, ekzemple: korpokulturo en la armeo, en profunuiĝoj, en lernejoj, en domoj de ripozo, en kuraclokoj, sanigejoj ktp. Partoprenos ankaŭ Regna Akademio de Artaj Sciencoj.

**Centra parto de Spartakiado** — konkura havas taskojn evidentigi sportajn atingojn de sovetaj korpokulturuloj kaj de partoprenantaj Spartakiadon anoj de eksterlandaj laboristaj sportorganizoj. La festaj konkuroj estos ludataj en du direktojn:

a) konkuroj, kiuj estos kalkulataj por ĝenerala trupa majstreco de Tutunia Spartakiado;

b) konkuroj, kiuj ne estos kalkulataj por ĝenerala trupa majstreco de Spartakiado, t.e. nekalkulataj konkuroj.

La programo de kalkulataj konkuroj enhavos la jenajn sep sportdisciplinojn, laŭ kiuj estos difinata la venkinto de ĝenerala trupa majstreco de Tutunia Spartakiado, nome:

1. **Dromsporto** (malpeza atletiko) trupo (= komando, taĉmento) 36 homoj (el ili 18 viroj kaj 18 virinoj). Programo: viroj — stafetoj 4×100 kaj 800+400+200+100, kuro je 8 km. tra arbaro (kalkulo je tri-sumo de tempo) kaj kvinlukto — longsaltoj post alkuro, lancĵetado, kuro je 200 m., diskoĵetado kaj kuro je 1500 m. (kalkulo je tri-sumo de poentoj); virinoj — stafetoj 4×100 kaj 400+300+200+100, kuro je 1,5 km. tra arbaro kaj trilukto-kuro je 60 m., kuglopuŝo post alkuro (kalkulo je tri-sumo de poentoj).

2. **Pafado** (trupo el 12 homoj, sendepende de sekso). En pafado por kalkulataj konkuroj estos tri ekzercoj. 1-a ekzerco: trilinia fusilo[1]) (individua pafado) je 200 m. aŭ ekzerco per laŭvola fusilo (individua pafado). Trupo — 6 homoj, distanco 200 m. Estos elektota unu el tiuj ĉi du ekzercoj. 2-a ekzerco: malgrandkalibra fusilo (individua pafado) je 100 m. En ĉiuj kalkulataj ekzercoj la pafado okazos en kuŝa pozicio.

3. **Naĝado** (trupo — 10 viroj kaj 8 virinoj) viroj — 300 m. surflanke, 1500 m. liberstile, kombina stafeto 4×100 (100 m. perbrake, 100 m. surdorse, 100 m. surflanke kaj 100 m. "krol" aŭ "treĝen"; kaj akvon-salto en somera ruĝarmeana vesto de sur alteco de 3 m. kun sekvonta naĝo de 50 m.; virinoj — 100 kaj 1000 m. liberstile. En ĉiuj kategorioj de naĝado individua estos kalkulata laŭ tri-sumo de tempo.

4. **Ciklado.** Trupa kuro tra forte krucita loko je 30 km. Trupo el 4 viroj, kalkulo laŭ tri-sumo de tempo.

5. **Peza atletiko** (viroj): a) levo de pesiloj — klasika kvinlukto, kiun partoprenos el ĉiu sporta unuo unu homo en ĉiu el la sep akceptitaj pez-kategorioj; b) franca lukto — partoprenos ankaŭ po unu homo en ĉiu el la sep kategorioj kaj c) ŝirado de ŝnurego — trupo el 8 homoj konsistas el partoprenantoj en pesiloj kaj lukto.

6. **Kurado kun artefaritaj malhelpoj.** Trupo — 5 viroj. Distanco — 400 m. Fundamentaj malhelpoj: irado sur ronda trabo longa 6 m., grimpado trans palisaro — 1,5 m. kuro, kurbiĝinte, kaj rampado je 20 m., saltado trans barilon altan 75 cm., transportado de 5 kartuĉaj kestoj — je 20 m. surkurado monton, altan 1,5 m., kaj alta longsalto de sur ĝi trans barilon altan 2,5 m. Ĉiuj malhelpoj troviĝas unu de alia je distanco de ekzemple 30—45 metroj.

7. **Sportludoj:** piedpilko (viroj) korbpilko (geviroj), gorodki (urbetoj) — (viroj) kaj teniso-trupa majstreco (geviroj). En ĉiuj ludoj estas permesate elpaŝi nur al unu trupo (taĉmento).

Rezultkalkulaj konkuroj estos ludataj inter trupoj de uniaj Respublikoj (RSFSR, USSR, BSSR, ZSFSR, Turkmena SSR, Uzbeka SSR) kaj eksterlandaj laboristaj sportorganizoj, ĉe kio, escepte RSFSR, ĉiuj prezentos kombinajn trupojn kaj RSFSR la trupojn de siaj 12 sportaj regionoj (sektoroj). En celoj de egaligo de ŝancoj la loko de RSFSR en ĝenerala trupa majstreco estos difinata laŭ rezultoj de regiona trupo de RSFSR, okupanta unuan lokon inter aliaj trupoj de RSFSR, laŭ sumo de poentoj en ĉiuj sep kalkulataj kategorioj de konkuroj.

Dank' al tiu distribuo de la fortoj de RSFSR la konkuroj por ĝenerala trupa majstreco de Tutunia Spartakiado devas iri sub la signo de aparta intereso. Konsiderante la diversecon de la programo kaj kalendaran tabelon de la konkuroj, intereso al la konkuroj daŭrados ĝis finludo de la plej lasta el kalkulataj kategorioj de sporto.

En kalkulataj konkuroj estos ludataj tri premioj je la nomo de Centra Ekzekutiva Komitato USSR, por la tri unuaj lokoj. Krom tio estos tri premioj por la plej bonaj trupoj de sportaj regionoj de RSFSR. Krom ludo de ĝenerala trupa majstreco de Tutunia Spartakiado en ĉiuj sep kalkulataj kategorioj de konkuroj, en ĉiu el la sep kategorioj estas ludata ankaŭ aparta trupa majstreco de Spartakiado. Ĉi tie la regionoj de RSFSR partoprenos je egalaj kondiĉoj kun Uniaj Respublikoj kaj okupos, sekve, koncernajn vicajn lokojn, ricevonte ankaŭ favoran finokazon de konkuro al tiuj premioj (artaj diplomoj), kiuj en nombro de kvin estos aljuĝataj en ĉiu aparta kategorio de sporto.

El "Korpokulturo kaj Sporto" n-o 20, esperantigis A. N. Lebedev.

[1]) Infanteria pafilo.

# TRA ESPERANTIO

## PRI NIA VORTARO

Sekve de nia alvoko por kunlaborado al la Vortaro, ni jam ricevis kelkan materialon. Dankon al ĉiuj sendintoj. El la ricevita materialo ni konstatis, ke ne ĉiuj kunlaboremuloj komprenas la problemon. Por eviti al aliaj miskomprenon pri la tasko, ni opinias necese fari jenajn rimarkojn:

1. La t. n. internaciaj vortoj ne havas en esperanto ĝis nun difinitan sencon. Temas do doni al ili precizan difinon. Por tio utilus al nia Kolektivo, ricevi sufiĉe detalajn klarigojn pri la senco(j), kiu(j)n havas en iu difinita nacia lingvo la vortoj, kies liston ni publikigis (vidu n-on 191 de "S-ulo"). Per komparo de la signifoj ekzistantaj en diversaj lingvoj, estos eble decidi pri la plej oportuna difino enkondukota en esperanto.

Por kunlabori utile, necesas funde koni sian gepatran lingvon kaj ne kontentiĝi per la difinoj, kiujn oni povas trovi en malgrandaj vortaroj. Estas vortoj, kies historia signifo ne ĉiam akordiĝas kun la senco, laŭ kiu oni ĉiutage uzas ilin. Esperanto tamen devas ankaŭ ebligi la tradukadon de historiaj verkoj.

2. Estas senutile sciigi nin pri la grado de internacieco de vortoj aŭ pri ilia ortografio en nacia lingvo. Nia Kolektivo, en kiu troviĝas du p r o f e s i a j l i n g v i s t o j, havas je sia dispono vortarojn el plej diversaj lingvoj.

Malgraŭ nia deziro, ke nia Vortaro estu kiel eble plej kompleta, ni tamen estas limigitaj per la nombro de paĝoj, kiuj ne devas superi 500. (La vortaro de Kabe havas 175 pĝ.) Sekve estas vane esperi, ke ni povos enmeti ĉiujn fakesprimojn el la diversaj metioj. Oni ne forgesu, ke eĉ en nacilingvaj pli ol dumilpaĝaj vortaroj ne troviĝas ĉiuj fakesprimoj.

Ni jam diris, ke la nuntempa stato en Esperantio ne permesas eldoni pli ampleksan vortaron ol tiun, kiun ni preparas. Ni ne estas fantaziuloj, kiuj kredas, ke iliaj revoj estas realoj. Kaj estas bedaŭrinda realo, ke la veraj esperantistoj estas ankoraŭ tre malmultenombraj. Oni unue pligrandigu la nombron de esperantistoj, t. e. de homoj, kiuj ne nur lernetis la lingvon, sed praktikas ĝin, abonas gazetojn ktp., — kaj poste oni povos prikonsideri serioze la eldonon de Enciklopedio en esperanto . . . E. L.

## EL NIA LETERARO

### Pri superpartieco

*Fost apero de nia artikolo, sub titolo:* Superpartieco *(n-o 192) ni ricevis plurajn aprobajn leterojn, kiuj montras, ke ni ne batalis kontraŭ ventmuelilojn. Ni opinias necese priparoli denove la temon k tiucele publikigas parton el letero, kiu montras konkretan situacion en iu grupo. Ni ne aldonos komentojn: la faktoj ja parolas sufiĉe elokvente per si mem.* E. L.

Kara K-do Lanti! Jus mi legis la plej novan n-on de "S-ulo", k precipe via artikolo pri S u p e r p a r t i e c o instigis min esprimi al vi mian profunde sentatan dankon. Kvankam jam ofte estas skribite pri tiu temo, necesas ĉiam denove k pli intense priparoli la ideologion de SAT k ĝiajn nuntempajn taskojn.

Konsiderante nian grupan vivon k nian SAT-rondon precipe, mi devas konstati kun bedaŭro, ke al la plej multaj K-doj mankas ankoraŭ la kompreno pri SAT-ideologio. Perfektiĝinte en esp-o k atinginte sufiĉan potencon en la grupo, unu aŭ alia, laŭ sia oratora talento, penas kaŝe aŭ malkaŝe trudi al la aliaj sian partian tendencon kiel la solan, veran religion. Kaj aliaj, kiuj ne estas parolkapablaj por defendi sian vidpunkton, forlasas niajn vicojn.

Mi citu faktojn: Fondita estas nia grupo en 1922 de K-do Schmitt (220) k mi kun kelkaj lernantoj. Ĉiuj entuziasmaj SAT-anoj. Tendencoj: komunista k anarkista. Kiam la spirita gvidanto, K-do Schmitt (SAT-ano 220, komunisto) forvojaĝis, la anarkismo triumfis en la grupo. Sed la K-doj restis entuziasmaj SAT-anoj. Post fondo de TLES okazis eksiĝo el SAT. Oni diris, ke SAT estas komunista k LEA socialdemokrata organizo. La vera, klaskonscia lab. esp. organizo estas nur TLES. Aliĝo al ĝi estas pli malmultekosta. Sekve estis detruata la grupo. La materialo de l' SAT-anaro, posedajo k standardoj estis forrabataj. Oni revekiĝis k fondis novan, duan grupon sur bazo de LEA — SAT. Tendencoj: komunista — socialdemokrata — senpartia. Anarkistoj ne povas aliĝi nian grupon. La ĉefa influo estas komunista. Sekve oni nun aŭdas, ke la anarkistoj estas demagogoj, etburĝoj, friponoj ktp., la socialdemokratoj estas demagogoj, burĝoj, naciistoj, imperiestraj socialistoj, la komunistoj estas nuntempe la veraj klaskonsciaj laboristoj ktp. — Kiel eliĝi el tiu dilemo? — Nur sendogmece edukante la membrojn de SAT k pritraktante pli profunde sennaciismon k la superpartiecon de nia organizo . . .

Sennaciece F r e d o B e c k (972).

* * *

### Malĝusta Raporto

"En 'S-ulo' n-o 187 mi legis la raporton pri la 7-a jarkongreso de ALLE verkitan de K-do J. Batta (246). Mi kun bedaŭro devis konstati, ke la raporto enhavas kelkajn tre gravajn malĝustajojn, kiuj povas tute malĝuste informi la SAT-anaron pri nia Ligo. Krom la faktoj, ke la kongreso okazis en Wiener-Neustadt k ne en Vieno, k ke estis reprezentataj ne 169 membroj, sed 169 v o ĉ o j po 5 membroj, do sume 845 membroj, mi konstatas jenon:

1. Nia estro K-do prof. Simon ne riproĉadis en sia parolado nian socialdem. partion, ke ĝi ne volas rimarki la gravecon de esp-o; li kontraŭe konstatis, ke la partio j a m la gravecon rimarkas k nin subtenas, sed ke ni ne estas ankoraŭ kontentaj k postulas o f i c i a l a n agnoskon de nia movado. —

2. K-do Klatil akre rifuzis ĉian kunlaboron kun la burĝa movado k konstatis nur, ke iam estas laŭokaza kunago necesa en aferoj pure komunaj (vidu "For la Neŭtralismon!", p. 13). Tute malvere estas, ke li parolis nek por, nek kontraŭ la burĝa movado, li kontraŭe klare parolis k o n t r a ŭ ĝi. La aliparoloj estis ĝenerale p o r lia propono, kion klare montras la voĉdonado (112 v. por, 26 v. kontraŭ).

Mi bedaŭras[1]) kiel SAT-ano, ke en "S-ulo" aperis tia raporto, enhavanta ne nur intencajn falsigojn, sed eĉ senteblan ironian pinton kontraŭ nia Ligo, kies estrarano ankaŭ mi estas. Mi petas por la publikigo de mia ĝustigo, kvankam pasis jam du monatoj.

Kamarade salutas A. C a r l e (6411).

* * *

### PROTESTO

Karaj K-doj!

Post legado de la artikolo "Ĉiam ankoraŭ" aperinta en "S-ulo" n-o 189, la Laborista Esp. Grupo el Verviers komisiis min protesti, ĉar K-do Grignard nur estis la peranto inter niaj grupanoj kaj la korespond-petantoj. La grupanoj ne tiel forte protestas kontraŭ la artikolo de K-do 1187 kiel kontraŭ via propra malseriozeco, kun kiu vi akceptis presigi lian artikolon. Li estis malkontentigita, li povis opinii havi rajton protesti. Sed, kion ni ne povas akcepti, estas, ke ne vin priinforminte antaŭe, vi tuj presigis la proteston.

Por esti ŝirmata kontraŭ la eventualaj protestoj, nia grupo nee respondis al **60** (sesdek) korespondpetantoj, per il. PK al ĉiu, por ke almenaŭ, kiu ajn petis korespondanton, ricevu kompenson. Se vi tion dezirus, ni povus havigi al vi liston pri la Gek-doj, kiuj ricevis niajn il. PK-ojn. Ĉu vi konas multajn grupojn, kiuj tiele agas por plenumi sian promeson, malgraŭ la elspezo de sufiĉe impona sumo? Kvar (4) el tiuj poŝtkartoj (ĉi tie haveblaj) revenis al ni pro nekonata adreso. Se iu el la kvar K-doj, kiuj ne ricevis niajn PK-ojn, protestus, ĉu vi ankaŭ presigus lian proteston? Se jes, vi povos pligrandigi la formaton de "S-ulo", ĉar la malmultaj membroj de nia grupeto povus facile plenigi paĝon, nur per la nomoj k adresoj de tiuj, kiuj ne respondis al la unua letero aŭ ĉesis subite korespondi, sen ia ajn averto. La grupo esperas, ke estonte, antaŭ ol presigi artikolojn kiel la supre cititan, vi almenaŭ bonvolos peti klarigon de la interesato. La grupo ankaŭ petas vin presigi tiun ĉi proteston en "S-ulo".

Por la grupo: La sekretario,
SAT-ano n-o 2821.

* * *

### La tramistoj de Krasnodar

Antaŭ monatoj en "S-ulo" aperis anonco komunikanta la deziron de 15 tramistoj korespondadi kun samfakanoj. Estis farata de mi laborplano detale priskribita kun ekzemplo de aranĝo. La rezulto de mia peno estas nula — respondo ne alvenis. Jam multaj

[1]) *Se la Estraro de ALLE sendus mem raporton, tia "bedaŭrindaĵo" ne okazus. Sed ALLE simple* ignoras *SAT-on. Kial? Ni ne scias. Ankaŭ ni ne povas klarigi al ni, kial K-do Jonas neniam respondis al niaj leteroj, kiujn siatempe ni sendis al li? Estante ano de la SAT-Estraro, li neniam plenumis sian oficon. Li eksiĝis el SAT k neniam sciigis pri la kialo. La tuta afero restas por ni vera mistero. K-do A. Carle klopodu por havigi respondojn al niaj demandoj. —* E. L.

antaŭ mi plendis pri nerespondo flanke de Sovetianoj, kaj mi ne kredis, ke eĉ malseriozuloj ekzistas en la rondoj aplikantaj nian lingvon por fakaj celoj. Nia sovetia Gek-daro ne miru, se iliaj anoncoj estas ignorataj.

Wotschke (745), Dresden.

## PRIKONGRESAJ PROPONOJ

### Propono 3

**Propono pri kompletigo de l' statuto de SAT**[1] (prefere al la ĉapitroj "celo" kaj "membroj")

1. Membroj de SAT ne rajtas iel ajn (per presajoj, paroloj, konduto, taktiko ktp.) helpi, partopreni aŭ propagandi iujn ajn "neŭtralajn" (burĝajn) organizojn, aranĝojn, imprezojn (?), kongresojn ktp. En esceptaj okazoj necesas permeso de EK de SAT.

2. Membroj de SAT rajtas aparteni al ĉiu ajn klasbatala organizo, kondiĉe ke ĝi ne kontraŭbatalas SAT.

3. Neniu SAT-ano rajtas havi interrilatojn kun klerikularo. Pastro ne povas esti membro de SAT.

4. SAT-anoj, gvidantaj esperanto-kursojn, devas por tio uzi la de SAT eldonitan klasbatalan, ateistan lernolibron "Petro".

5. La interrilatoj inter la ge-SAT-anoj estas kamaradecaj kiel de samklasanoj, neniel kiel de "samideanoj", tio estas esperantanoj. (Eksteraj formoj: sinturno estas "kamarado", saluto ne la forvivintaj "bonan tagon!" ktp., sed "liberon!")

7075, 7076, 9864, 10 750.

---

## *INTER NI*

*Ni ĉiuj scias, kiom la idista entrepreno malhelpis la esperantistan movadon. Plenmano da malspritaj fanatikuloj, aplombe parolantaj je la nomo de pseŭdo-scienco, ofte sukcesis atingi, ke homoj jam konvinkitaj pri neceseco de tutmonda interkomprenilo kaj pri vivebleco de artefarita lingvo, tamen lernis nek esperanton, nek idon.*

*Nun la idista movado likvidiĝas. Kelkaj idistoj tute forlasis la batalon, aliaj aliĝis al nova projekto de lingvo kaj ceteraj, pli saĝaj, simple eniras la esperantajn vicojn.*

*La batalo inter esperanto kaj ido daŭris dum 21 jaroj kaj finiĝis per plena malvenko de ido.*

*Sed oni erarus opiniante, ke la malbona influo de ido ne plu efikas sur nian movadon. En la interna vivo de nia lingvo sentiĝas ankoraŭ la pedanta logikemo enportita de idemuloj. Mi mem pente konfesas, ke dum kelka tempo mi forte estis influata de la idistaj kritikoj. Por obei ŝajnan logikon, ni tro ofte emas plipezigi nian simplan kaj flekseblan lingvon.*

*Zamenhof tre klare skribis: "Eksonis la sonoriloj en la granda blanka konstruo kaj multaj junaj knabinoj sin montris en la ĝardeno . . ." (Fabeloj de Andersen, pĝ. 56). Sed hodiaŭ niaj idemuloj skribas "konstruaĵo", pretekste, ke tio estas pli logika. Eble, sed konstruitaĵo entenus ankoraŭ pli da logikeco! . . .*

*Multajn similajn ekzemplojn mi povus citi por montri, ke la ŝajna logiko de idistoj kaj idemuloj malboninfluas sur la internan vivon de esperanto.*

*Viva lingvo devas obei la leĝojn de la vivo. Kaj tiuj leĝoj havas nenion komunan kun logikaj principoj aplikeblaj nur rilate abstraktojn. La vivo obeas la leĝon de minimuma peno. Tial la ordinara homo senkonscie ĉiam tendencas uzi por sin komprenigi nur la minimumon da lingvoelementoj.*

*Estas bone konate, ke scienculoj ne parolas la saman lingvon kiel ordinaruloj. Kio estas necesa en sciencaj verkoj, tio aspektas pedanta en la ĉiutaga uzado de nia lingvo.*

*La idista fuŝentrepreno fiaskis. Restas al ni tute seniĝi je la pedanta idismo, kiu enŝteliĝis en niaj vicoj . . .* E. L.

[1]) Redakcia atentigo. — La lingvaĵon de proponoj ni ne ŝanĝas. Sekve ni ne akceptas respondecon pri ilia lingva korekteco.

---

## Savu la esp. movadon inter kom. junularo de Sovetio!

**Nuntempe la gazeto "KIM" eldonata de Kom. Junular-Internacio en Moskvo, diskutas pri intern. lingvo de la junularo. La redakcio k iuj K-doj parolas kontraŭ esp-o, k oni proponas studi naciajn lingvojn (anglan, francan, germanan). Sed la esp-istoj faras siajn respondojn. La polemiko donos bonan rezulton nur tiam, kiam la tutmonda junularo sendos sian opinion per leteroj laŭ adreso: Sovetio, Moskvo, Novaja ploŝĉad 6/8, al redakcio de "KIM". Ne forgesu vian devon!** 6123.

## Esperanto k anarkista junularo

La unua kongreso de la Anarkista Junulara Internacio okazis 29./30. majo en Huizen apud Amsterdamo. Ĉeestis delegitoj el 7 landoj. Oni akceptis principdeklaron kombinitan el 2 projektoj. Laste oni forte indikis la utilon de esp-o k rekomendis denove la lernadon, por ŝpari tempon k fortojn. La adreso de l'sekretariejo estas: M. Stevens, Shackletonstraat 16, I, Amsterdam-West (Holando).

---

## ESPERANTO EN ARMENIO

Ĝis 1920 en Armenio ne ekzistis unu espisto, k oni ne sciis, kion signifas esp-o. En 1921 mi transloĝiĝis el Tifliso al Erivano, k jam en sekvanta jaro faris la proponon, fari esp-on deviga lernobjekto en lernejoj. Tiun proponon oni ne akceptis. Mi propagandis sole. En 1924 alveturis K-do Sevak, k ni komencis propagandi duope, inter laboristoj k en jurnaloj. Post multaj artikoloj en jurnaloj ni sukcesis en okt. 1924 malfermi kurson. Post nelonge ni povis organizi esp. societon de Armenio. Kursoj okazis ankaŭ en 1925 k 1926. En tiu jaro enskribiĝis 400 personoj. Esp.-armenaj lernolibroj estis elĉerpitaj, k oni lernis sen lernolibro, pro kio multaj forlasis la kursojn. Eldono de esp. armena lernolibro prokrastiĝis, k en pasinta sezono ni ne sukcesis organizi kurson. Mi disveturis en la provincetojn de Armenio k agitis por esp-o, legante ricevitajn salutleterojn de eksterl. lab-istoj. La kamparanaro multe interesiĝis k deziris lerni. Mi malfermis kursojn, kie estis oportune: en vilaĝoj Artaŝat, Ĉigdamlu k Beĝazlu. Same mi sukcesis malfermi kursojn en Takia en lernejo k en Aŝtarak por gelernantoj de superaj kursoj.

Artaŝes Ohanĝanjan (4999), Erivan, Armenio Sovetio.

## TRA LA MOVADO

(Kroniko)

**FRANCIO. Grenoble.** La lab. esp. movado en tiu ĉi loko naskiĝis en okt. 1925. En la unua kurso (sen instruanto) finis la lernolibron 5 K-doj en 1926. Dua kurso en tiu jaro malsukcesis. Nova kurso malfermiĝis en okt. 1927. 8 Gek-doj daŭrigas la lernadon. En feb. 1928 nova kurso kun 6 komencantoj. La neŭtrala grupo laboras pli sukcese, ĉar ili disponas pri la gazetaro k Radio, kiu depost 1. apr. dissendas kurson. (7998). —

**SOVETIO. Nijnij-Novgorod.** Dum pasinta vintro en N.-Novgorod laboris 18, en la gubernio 10 esp. ĉeloj k rondetoj. Je 1. aprilo en ĉiuj ĉeloj k rondetoj partoprenis 460 pers., el kiuj 248 estis membroj k amikoj (subtenantaj membroj) de SEU. El la ĉeloj plej bone laboris tiu ĉe Telefona fabriko je nomo de Lenin. Ĝi havis grandan korespondadon, eldonis sian murgazeton ktp. Estas notindaj ankaŭ ĉeloj en Sormovo (5), kiuj konsistas precipe el laboristoj, du ĉeloj en lernejo je nomo de Kropotkin (lernantoj), ĉelo de instruistoj ĉe la sama lernejo, ĉelo en Tatara Pedagogia Teknikumo, 3 rondetoj en ruĝa armeo ktp. Dum feb. k marto Gubernia K-to de SEU aranĝis varban konkurson, rezulte de kiu je 1. junio la nombro de membroj de SEU kreskis ĝis 267 (71 aktivaj k 186 — amikoj). Bedaŭrinde ne ĉiuj ĉeloj tre aktive partoprenis la varbadon, aliel la nombro povus esti ankoraŭ pli granda. Dum junio—sept. Gub. K-to de SEU aranĝas konferenc-kursojn por ĉelgvidantoj, por dum venonta jaro ankoraŭ pli aktivigi la laboron en ĉeloj. Preskaŭ en ĉiuj urbaj ĉeloj dum vintro funkciis elementaj kursoj, krom tio ĉe urba k Kanavina (apudurbo) komitatoj de IRH kombinitaj kursoj, dum kiuj IRH-anoj studis IRH-movadon k esp-on. Granda atento estis dediĉata al praktika utiligo per SAT. Dum la duonjaro estis ricevataj 310 leteroj kaj forsenditaj 479, publikigataj en la gazetaro salutleteroj al Oktobra Revolucio, al la tago de Ruĝa armeo, al la 5-jara jubileo de IRH, al 1. majo. Estis organizata kunligo de lokaj organizoj de IRH kun eksterlandaj. Estis presataj dum 6 monatoj 51 leteroj, artikoloj, notoj el Esp-Servo ktp., kiuj dividiĝas jene: "Nijegorodskaja Kommuna": 35; "Krasnij Sormoviĉ": 6; "Molodaja Ratj": 5; Nijegorodskij Rabselkor": 4; "Smiĉka": 1. En murgazetoj estis publikigataj 23 leteroj, notoj ktp. SAT-anoj helpis al K-do Krouch, membro de CK de Amerika Kom. Junularo, dum lia estado en N.-Novgorod, tradukante liajn paroladojn ktp. Gub. Kom. de IRH dissendis specialan leteron al ĉiuj organizoj de IRH en la gubernio, en kiu ĝi rekomendas uzon de esp-o. En la Gub. Kom. de IRH estis elektata reprezentanto de SEU. 18. marto SEU-komitatano faris salutparoladon dum solena kunveno de IRH, post kiu sekvis esp-lingva kantado de "Internacio" k "Muro de Komunanoj", plenumita de esp. ĥoro. Per radio estis farataj du paroladoj, el kiuj unu estis rus- k esp-lingva kun posta esp. kantado. De sept. estos malfermataj radio-kursoj. Dum 6 monatoj estis vendataj 604 lernolibroj k vortaroj k 109 ekz. de aliaj libroj. Sume 713 ekz. 27. majo okazis urba kunveno de SAT-anoj, dum kiu unuanime estis decidate opinii necesa pliatligon de SAT-kotizo je 1/3. La kunveno rekomendis al ĉiuj SAT-anoj jam por 1927 pagi aldone al la kotizo 25 kop. Estis priparolata ankaŭ projekto pri interrilatoj de SAT k LEA-oj. La kunveno opinias la projekton de SAT bone solvanta la problemon.

Esp. organizoj translokiĝis en novan ejon: Osipnaja 22, Nijnij-Novgorod. Kunvenoj okazas vintre ĉiudimanĉe de la 2-a ĝis la 5-a k somere ĉiuvendrede de la 7-a ĝis la 10-a vespere. Ĉiuj pretervojaĝantaj esp-istoj estas petataj viziti ĝin.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

**organo de Tutm. Asocio de Geinstruistoj Esp-istoj** (TAGE), n-o 4/5 estas sendita al 3000 esp-instruistoj. Tiu propaganda n-o aperigas valorajn artikolojn de prof. P. Bovet, direktoro de la Instituto J. J. Rousseau, pri la Intern. Oficejo de Edukado, de prof. d-ro Dietterle, membro de la Intern. Centra Kom., pri la laboroj de IALA (International Auxiliary Language Association - Usono) k ilia rezulto tre favora por esp-o. En speciala alvoko prof. Dietterle instigas la esp. instruistojn kolektiĝi en TAGE pro la tre necesa organizita laboro por esp-o en lernejo k instruistaro. (Vidu ankaŭ anoncon en tiu ĉi n-o).

NIA POŜTO

**9627.** — 1. Mi komprenas vian indignon pro la mallojala atako kontraŭ esp-o en via fakgazeto. Ne utilus tamen, se mi respondus en "S-ulo". Vi mem aŭ iu alia ALLE-ano devas rebati la fuŝargumentojn en la gazeto mem en kiu aperis la atako. Cetere tempo absolute mankas al mi. — 2. Pri la famaĉo, ke SAT estas "komunista propagandaparato", ĉu decas respondi? Ĉiu sincera homo ja bone scias, ke nia Asocio estas tute sendependa k staras neŭtrale super ĉiuj lab. partioj. Sed estas sendube personoj, kiuj havas ian intereson disfamaĉi tiun malveron. E. L.

**641.** — Ne necesas resendi la artikolon. La elspezoj nur estis tiuj por sendo de ordinara presajo. Red.

# K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

**Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-ajo = esperantajo.
**Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

**BRITIO**

K-do Arthur Whitam (1351), Labour Club, Cornholme, Near Todmorden, realiĝas al SAT k serĉas laboron kiel teksisto en Sovetio. Notu la adresŝanĝon!

**ĈEĤOSLOVAKIO**

— Per anonco en "S-ulo" (185) mi ricevis multajn koresp. proponojn el Sovetio. Ne estis eble resp. tuj al ĉiuj k mi petas pardonon de K-doj nericevintaj ankoraŭ resp. de mi. — Carlo Jirka, Ĉ. Budějovice.

— PM-valorojn mi interŝ. kun tuta mondo. Mi posedas multajn PM por elekto. Resp. garantiata. Adr.: Josef Singer, Fabrikstr. 23, Elbogen.

**FRANCIO**

K-do Julien Dupaquier, Avosnes par Vitteaux, Côte d' Or, dez. koresp. kĉl., krom Germanio, L, PI. Resp. certe.

**GERMANIO**

K-do Max Renner, Hertigswalder Str. 14, Sebnitz i. Sa., dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PI.

**HISPANIO**

K-do Antonio Nadal, str. Huertos, 26—2°, Palma de Mallorca, interŝ. PM, kĉl., tuja k nepra estas mia respondo.

**LATVIO**

**Atentu!** — Latvia Lab. Esp. Societo, Filio de Liepaja intencas aranĝi koresp. vesperon. Ni petas sendi al ni L, PK, bfl., k esp-ajojn por la ekspozicio. Sendu multnombre! Resp. garantiata. Adr.: K-do Z. Plaks, Poŝtkesto, 253, Liepaja.

**LITOVIO**

K-do J. Kaĉinskas, Kaŭliniu, g. 12, Radviliŝkis, dez. koresp. kĉl. gelaboristoj, L, PI, certe resp.

**SOVETIO**

— **Atentu!** K-do A. Nikitin, Timaŝevo, Samara gub., dez. koresp. pri lab. vivo, labormovado kĉl. kun lab. organizoj, L, PK, fotoj, gaz., jurn., necesas daŭraj korespondantoj. Resp. garantiata.

K-do I. Rojnov (laboristo), ul. 3 Ijula 36, kv. 2, Leningrad, dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo.

K-do Geo Teterin, ul. Kr. Zorj, 19, kv. 16, Leningrad, dez. koresp. kun kom. kaj social. gejunuloj.

— Gekursanoj de pedteknikumo emas daŭre koresp. pri ĉt. kĉl. precipe pri socipolitika k pedagogia temoj. Certe resp. Adr.: Pedagogia Teknikumo, Barnaul (Siberio).

K-dino Ugijumova E., str. Proletarska, 159, Barnaul (Siberio), dez. koresp. kĉl. junularo k virinaro pri ĉ. temoj.

K-do Kozlov, str. 5, Altajska, Barnaul (Siberio), interŝ. L, PI, PM, kĉl. (juna amatorpentristo). Resp. garantiata.

K-do I. Belozjoreev "Promsojuz", Barnaul, interŝ. L, PI, kĉl., pri lab. k politikaj temoj. Resp. garantiata.

K-do B. Kalinin, str. Nikitinska 79, Barnaul, dez. interŝ. NUR PM.

K-do P. Ĥozov (laboristo 20 j.), str. Nikitinskaja, 171, "Probeda", Barnaul, interŝ. L, PI, pri junul. k lab. temoj. Resp. garant.

K-do B. Breslau, Volhonka, 6, kv. 8, Moskvo 19, dez. koresp. L, PI, precipe kun partoprenontoj de Göteborga Kongreso por antaŭe konatiĝi. Nepre resp.

K-do V. Kostrinin, Peski, Klub Postrojka, Ivanovo-Voznesensk, dez. koresp. kĉl., L, PI.

K-do K. Mironov, vil. Petrikovka, Rajispolkom, distr. Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl.

— Al K-do Kurt Straube sendas saluton Paŭlo Ketov k petas noti la novan adreson.

SAT-anoj korektu en "Jarlibro 1928" mian adreson: anstataŭ "Sennoj 45" skribu "Sadovaja 59". Paŭlo Ketov (SAT-ano 10008 — Ustkamenogorsk).

K-do G. Morderer (junkomunisto), bulvardo de Ŝevĉenko, 6/3, Kiev, dez. koresp. kĉl.

K-do S. Kaganovski (presisto, 22-jara), Jilanska str. 89-a/3, Kiev, interŝ. L, gaz. kĉl. Resp. garantiata.

— Esperanto-rondeto, Proletarska str. 69, ŝkola Zavod, 3, im. Ratmanskogo, Kiev, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

— Atentu ruĝfrontanoj! Mi tre bezonas koresp. kun franclandaj ruĝfrontanoj, ĉiam resp. Adr.: Kiev, Kreŝĉatikski pr. 5, 1-b, al Leo Golovanevski.

— Esperanto-rondeto ĉe klubo de presistoj, Klub Drukariv, str. de Vorovski, 42, Kiev, dez. koresp. Resp. garantiata.

K-do Miropolski, Remeslona str. 6, Smola, Cerk. okr., dez. koresp. kun kom. junuloj k partianoj. Resp. garantiata.

— Lab. Klubo de im Lenin ĉe Proletara Sukerfabriko, dez. koresp. kĉl. lab. kluboj pri ĉ. temoj k. lab. vivo. Resp. garantiata. Adr.: Timaŝevo, Samara gub., Laborista Klubo al K-do Starkov.

**3000 Esperanto-Instruistoj**

ricevis propagandnumeron 4/5, 1928 de

**Internacia Pedagogia Revuo**

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj (TAGE)

**3000 Esp-o-Instruistoj**

organiziĝu en TAGE, abonante IPR, por sukcesigi Esperanton en

**Lernejo k. Instruistaro**

Jarabono nur 3 germ. mk.

Kiu ne ricevis la propagandn-on, skribu tuj al **M. Goldberg, Leipzig S 3,** Frohburger Strasse n-o 68 (Germanio).

**SVISIO**

— La Club ouvrier d' échecs, dez. koresponde ŝakludi. Adreso: Cercle Ouvrier, Lausanne.

ATENTU!

Jenaj gek-doj dez. koresp. pri ĉ. temoj: Willi Rothe, Max Pohlers, Karl k Herbert Mühleisen, Milda Kramer k Hans Wienhold. Adr.: Lab. Esperanto Grupo "Fajreroj", gastejo Kotsch, **Remse a. d. Mulde** (Germanio).

**● Atentu la informon! ●**

Ni organizas laŭ produktada sistemo novajn SEU-ĉelojn ĉe

1. **Administrejo de Samara-Zlatousta fervojo** (adreso: K-do Afanasjev, USSR, Samara, Vilonovskaja 110, kv. 5).
2. **Tutaj fervoj- k distrikt-komitatoj de fervojista profunuiĝo** ĉe la fervojo (K-do Jefremov, Samara, Vokzal, centralnij telegraf).
3. **Servo de vojo** ĉe stacio Samara (K-dino Nikitina; Samara, Vokzal, ĥoz.-mat. otdel.).
4. **Lokomotivtenejo** (K-do Necenko, Samara, Novo-Sovetskaja, 365/44, Leningradskij per.).
5. **Servo de ekspluatado** ĉe stacio Samara (K-do Jermakov, Samara, Uralskaja 28, kv. 6).
6. **Fako de sanigado** ĉe administrejo de l' fervojo (K-do Gureviĉ, Samara, Pesoĉnij pereulok 2, kv. 2).

Plej ĉefa tasko de l' ĉeloj estas internacia korespondado por la laborkolektivoj (vivo, stato, laboro de gelaboruloj ĝenerale k de la fakoj aparte same pri virinoj, gejunuloj; politikaj k sociaj demandoj; IRH, korpkulturo ktp.). La korespondajoj estas vaste utiligataj en murgazetoj, en komunaj kunvenoj de l' gelaborulaj kolektivoj. Finfine la ĉeloj devas entiri tutan gelaborulan kolektivon en intern. kolektivan korespondadon. — Sen via kunlaborado la ĉeloj ne sukcesos plenumi la taskon. Do, helpu ilin per viaj korespondajoj.

Komisiite: B. Jeleznjakov (5583).

ENHAVO:


| | paĝo |
|---|---|
| Maxim Gorki pri proleta verkisto | 319—20 |
| Letero el Kanado | 320 |
| Bretonio al la bretonoj | 320 |
| Inaŭguro de monumento por Ferdinand Lassalie (Lasal) en Vieno | 320 |
| La koloniigo de Nova Gvineo | 321 |
| La kamparana potenco en Belgio | 321 |
| Mia vojaĝo en Germanio | 321—22 |
| Parizo kaj la parizanoj | 322 |
| Sennaciula Sporta Paĝo | 323 |
| Tra Esperantio | 324—26 |
| Korespondado, anoncoj | 326 |


Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)